



LA PACDEFENDANTO



N-o. 43/44. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO. jul.-aŭg. 55.

OTROKOVICE - LA PLUA MEJLOSTONO EN LA EPOKO DE "MEM"

Ĝojige pasis la tagoj de nia TUTSTATA la 7-11. de julio 1955 en Otrokovice sub la devizo "PER ESPERANTO POR LA MONDPACO!" Kunvenis pli ol 300 gekamaradoj el ĉiuj lokoj de nia lando por reciproke diri al si siajn spertojn, sukcesojn kaj malfacilaĵojn.

Delegitoj el Francio, Danlando, Svedio, Austrio kaj Usono donis al nia TUTSTATA vere internacian aspekton. Ĉeestis reprezentantoj de Ĉsl. komunistaj partio, sindikato, agbestraro, ĵurnalistoj ktp. Ankoraŭ neniu nacia kongreso en nia lando ricevis tiom da salutleteroj kaj telegramoj el la tuta mondo, kiom atingis nian TUTSTATAN. Nur por menĉi ilian limigitan enhavon, la pagoj de nia gazeto ne sufiĉas. Ĝis la lastan momenton la kunvenintoj streĉite atendis la alvenon de sovjeta delegito, k-do. F. Bokarev, kiu samtempe kun salutletero anoncis, ke li jam havas aprobon de la Scienca Akademio en Moskvo kaj preparas sin veni per aviadilo al Otrokovice. Simile informis ankaŭ k-do. Canko Murgin, laboranto de Karl Marks Instituto en Sofio. Bedaurinde restis al ni nur iliaj salutleteroj kaj la k-do. mem, kiuj tre malfrue komencis klopodi recevi la vojagformalaĵojn, jam ne sukcesis tiujn gastantepe akiri. Sed malgrau ĉio, la leteroj de k-do. Bokarev, kiu atingis nian konferencon ĵus la ĉefan tagon/10. de julio/ kaj estis laŭlegita, efikis pli ol atombombo. Ĝi estis grava dokumento por ĉiuj esperantistoj kaj ne eblas preteriri, sen doni gnan enhavon al via informo por entusiasmigi ankaŭ vin, kiuj ne povis persone auskultati. Jen ĝia kopio:

Moskvo, la 3/7.1955.

Restas ankoraŭ tri tagoj ĝis la komenco de la konferenco en Otrokovice kaj mi ĝis nun ne scias, ĉu mi efektive venos. Eble post 1-2 tagoj mi flugos per aviadilo al la konferenco, sed povas esti ke por tio jam ne sufiĉos la tempo. Pro tio mi sendas samtempe salutleteron.

Via leteroj al la Sovjet-Unia Scienca Akademio estis favore akceptita kaj la 18. de junio en kunsido de literatura kaj lingva fakoj de la Akademio estis akceptita decido delegi min al la konferenco en Otrokovice. Se mi tamen ne venos, dependos nur de iuj formalajoj por kies plenumo ne restis sufiĉa tempo. Bonvolu diri mian saluton kaj tiun de aliaj sovjetaj esperantistoj al la konferenco.

En la sama kunsido la fakoj por literaturo kaj lingvoj de la akademio decidis pri fondo de Sov. Unia Esperanto Asocio, kiu funkcios en la kadro de la Scienca Akademio. Tiu ĉi decido estis akceptita laŭ iniciato de kelkaj influaj sovjetaj lingvoscienculoj: akademiano V. Vinogradov, profesoroj Jarceva, Jirkov, Majtinskaĵa kaj aliaj. La 12. de julio estos konfirmata Organiza komitato de la Asocio. Inter la membroj de la Org. komitato estas lingvoscienculo, membro-korespondanto de la Akademio, B. Serebrennikov. La Org. komitato preparos statuton por la asocio kaj planos la laboron/eldono de revuo, literaturo, propagando de paco, fondo de filioj ktp./ Ni ĉie renkontas aprobon kaj helpon. La legendo, ke Esperanto en Sovjet-Unio generale

estas malaprobata, estas malgusta. Mi bedaŭras, ke mi ne povas plene informi vin pri ĉiuj, niaj klopodoj, ĉar kelkaj niaj iniciatoj ankoraŭ ne estas finplenumitaj. Ni kredas, ke autune jam komencos por ni vigla laboro. Ĉio dependos de nia aktiveco. Bedaŭrinde, ni iniciatintoj estas tre okupitaj homoj. Malfacile estas trovi liberan tempon por Esperanto-laboro, sed ni tamen iom da tempo por tio trovos. Mi devas ankaŭ informi vin, ke sekve de via alvoko en "L.P." mi ricevis preskaŭ cent leterojn, sendaĵojn de revuoj, dokumentoj, libroj ktp. Ĉio multe helpis al nia laboro. Mi ne havas eblecon danki al ĉiu sendinto aparte. Mi petas vin, transdonu per via revuo mian dankon al ĉiuj por ilia kamaradeca kunhelpo.

E. Bokarev

Se ni nun tiras la resumon kaj ĉiujn konsekvencojn el la raportoj de E. Bokarev, ni povas konstati, ke la decidoj faritaj en Moskvo substrekas la pravecon de niaj ĝisnunaj asertoj kaj donas en niajn manojn argumenton, kiu atestas la gustecon de nia nova voĉo. Homoj, kiuj ĝis nun kuragis diri, ke Esperanto estas ilo de kapitalistoj, kosmopolitajo ktp. estas devigitaj eksilenti kaj precipe en la popoldemokrataj ŝtatoj ĉar espereble baldaŭ oficialigos, ke la fama Sovjet-Unia Scienca Akademio sangis, respektive korektis sian starpunkton al Esperanto, dank al kelkaj eminentaj sovjetaj lingvoscienculoj kaj ankaŭ dank al la persista kaj senlaca agado de niaj ĉiulandaj esperantistaj pacdefendantoj sub la gvido de la MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO.

Ne tute ĉeĉus, ke ni nun moku la erarintojn, kiuj sen pliprofundaj esploroj nur blinde ripetis frazojn, sed ni montru per ankoraŭ pligranda aktiveco en la monda pacmovado la gravan rolon, kiun kapablas ludi Esperanto en la manoj de sinceraj homoj, kiuj deziras nenion pli ol sekuritan kunvivon de ĉiuj nacioj kaj por tiu celo per ĉiuj rimedoj sekurigi la tutmondan pacon. Nestuj ĉiuj komprenos la novan situacion. Kelkloke eble niaj gekoncedoj renkontigos ankoraŭ kun

neinformitaj homoj, kiuj faros al ili malfacilaĵojn, sed tiuj jam ne povas geni nin. Ni venkis, la pravo kaj la vero venkis, kaj malpravuloj devas cedi, eĉ se ili tiel ne faros tuj, sed ili ne plu ĉe prudentaj homoj trovos apogon.

Nia TUTŜTATA ankaŭ montris, ke por batali per Esperanto por la mondpaco en popoldemokrataj landoj, estus ridinda bezoni ofici-alan permeson. Nia TUTŜTATA mem ne havis la aprobon de la centraj instancoj, sed tamen neniu kontraŭis gin. Oni estiĝ bone informita kaj certe ankaŭ nia tuta agado severe observita.

Ni povas diri, ke nia konferenco entute procedis bone kaj en plena harmonio kun la interesoj de nia registaro, kio donos al ni pluajn avantaĝojn. Sed malgraŭ tio necesas konstati, ke ni donis pli da loko al poresperantaj aferoj ol al peresperantaj, kaj tio estas grava eraro. Dum la elekto de Tutŝtata konsulta Komitato estis akcentitaj ĉefe la funkcioj de lingva kaj organiza fakoj kaj tiu de la pacdefenda nur apenau menciita, kiel la lasta fako. Kaj ree tiu eraro rezultis el tio, ke estis proponita kaj elektita kiel oficiala organo de la TEKK ne la PACDEFENDANTO, sed NIA SPEGULO. El tio evidentiĝas por la oficialaj instancoj, ke la defendo de paco estas nur fako duaranga, kvankam ĝi devus esti la ĉefa celo de nia movado. Oni povas ankaŭ suspekti, ke sub la devizo "PER ESPERANTO POR LA MONDPACO" sin kaŝas homoj, kiuj celas antaŭ ĉio nur propagandi Esperanton, egale por kiaj celoj ĝi servus.

En la nuna tempo la Esperantomovado en nia lando povas esti reprezentata unusole nur de esperantistaj pacdefendantoj kaj se la elektita Tutŝtata Esperantista Konsulta Komitato/TEKK sin konsideras gvidanta centra komitato, poste ĝi nepre devas sin ankaŭ kiel tia prezenti al la oficialaj instancoj kaj ne kiel poresperanta propaganda aparato. Ni esperu, ke troviĝos vojo iel korekti ĉi tiun erar-

on, por eviti eventualajn damaĝojn al nia gis nun bonege prosperanta movado. Kompreneble, ĉi supre menciita problemo estas pure interna nia afero, kiun ni ankau nur inter ni pritraktu, sen informi pri ĝi pli vastan, eble ankoraŭ neinformitan publikon.

Meritas ankau menci la gravan fakton, ke nia TUTSTATA sukcesis unuigi ĉiujn progresajn esperantistajn fortojn por unu komuna celo: la batalo per Esperanto por la mondopaco.

Plue, la okazigo de nia TUTSTATA donis ankau traŝan argumenton en la manojn de niaj kumbatalantoj en la ceteraj Popoldemokratioj, per kiu ili povas defendi sian agadon, demonstrante, ke en Ĉeĥoslovakio ĝi estas favorata.

Malgraŭ ĉiuj sukcesoj necesas prikonsideri ankau kelkajn malbelajn aspektojn de nia TUTSTATA. Unu el la plej malbonaj estis la nesufiĉa disciplineco de niaj gekamaradoj, kiu multe malhelpis al ĝia plensukcesa procedo. Nome multaj gekdoj ne trovis necese ĉeesti ĉek de la komenco kaj alvenis kvazaŭ gastoj nur por sabato kaj dimanĉo/la ĉefaj tagoj/. Tiu stato devigis la arĝantojn al diversaj programŝanĝoj kaj finfine rezultis neeblecon arangi diversajn fakkunvenojn, kiuj estis proponitaj. Ne eblis la lastajn du tagojn dividi tion, ke ĉiu programero estus envicigita. La tempo apenau sufiĉis por pritrakti generale ĉefajn aferojn, ja eĉ tiujn ni ne kapablis definitive solvi. Povas esti, ke multaj gekdoj havas por tio sian senkulpigon, sed tiuj era-roj tamen instruu nin almenaŭ tion, ke estonte ni klopodu laŭeble eviti.

Ni povas ankau konstati, ke la opinioj de kelkaj kdoj, kiujn poste eĉ resumis en sia finparolado ano de la estraro, kdo. Omelka el Otrokovice asertante, ke sufiĉas por la venonta II. TUTSTATA nuraj du tagoj, estas malgustaj, ĉar ili tiris tiun ĉi konsekvencon ankau nur el la ŝajna fakto, t.e., el la nedisciplineco de niaj anoj, kiuj venis al la TUTSTATA nur por la solenaj du lastaj tagoj, sen ke ili estus prikonsiderintaj la duan kaj pli gravan faktan, nome,

ke ĵus pro tio multaj programeroj kaj eĉ gravaj problemoj inter-naj, ne povis esti solvataj pro manko da tempo. Multaj gekdoj tute ne trovis la eblecon au, a parte en fakkunvenoj au dum generalaj diskutoj publikaj siajn opiniojn kaj proponojn, nur pro tio, ke la tempo estis tre limigita kaj tio eĉ por la ĉefaj parolantoj. Al tiuj gekdoj ni nun volas doni lokon almenaŭ en nia bulteno, se tio al ili sufiĉas.

Fine necesas menci la gravan rolon, kiun ludis por la tuta arango niaj vere oferemaj gekdoj el Otrokovice. Multaj preskau ne trovis dum tiuj 5 tagoj tempon por dormi, neparolante pri personaj ĝuoj. Ĉiu el ili fidele staris sur sia posteno por sincere plenumi sian esperantistan devon.

Precipe meritas publikan laŭdon k-dinoj Fany Matušová kaj Evjáčková, kiuj jam dum monatoj antaŭ la TUTSTATA laboregis por ĝia sukceso, kdo. Omelka kun sia edzino, kiu spite ŝia nebona sanstato kunlaboris jam antaŭ la konferenco kaj dank al iliaj bonaj konsiloj la grupo solvis ĉiujn problemojn, plue profesoro Josef Kožený, kiu oferis la tutan semajnon de sia libertempo kaj ankoraŭ nun laboras por likvidi la postkonferencajn aferojn, k-dino Adamecová el Brno, kiu la tutan semajnon per sia trankvileco kaj meditado grave kontribuis en nervstrecĉaj momentoj dum la konferenco, kdo. Všeček el Olomouc, kiu prizorgis por ĉiuj fervojrabitelojn, kdoj Rudolf el Olomouc kaj d-ro. Mchapl, ing. Chobola el Humpolec, gekdoj Kotřelová, Prandorfis el Otrokovice, k-dino Honzová el Gottwaldov, k-ino Bakajová kaj aliaj. Ne oblas ĉiujn ĉi tie nomi. Ili ĉiuj la nomitaj kaj ne nomitaj akceptu ni -ajn plej sincerajn dankojn por ilia oferema kunlaboro.

Kompreneble ni ankau ŝuldas sinceran dankon al la artista kolektivo "Verda Caro de Julio Baghy" el Praha, kiu gravo kontribuis sur kultura bazo kaj al nia japana kdo Masao Miĝamoto, kiu afable sendis filmojn "Hiroŝima" kaj "Infanoj de 1 Atombombo, kiuj

grave kontribuis por pligrandigi nian aktivecon en la batalo kontraŭ la arasmortigiloj kaj la amerikanaj militinstigantoj. Since-re ni dankas ankau al la estraro de la uzina klubo SVIT en Otrokovice, kiu ĉefe ebligis la arangon de nia konferenco, disponente al ni sian klubdomon en kiu pli ol 300 gek-doj samtempe povis logi, mangi kaj kunvenadi, per kio ĝi tre grave helpis al la sukcesa procedo de nia TUTŬTATA.

Certe ankau estas inter ni multaj ne kontentaj gek-doj, sed tiujn ni petas pardoni al ni eventualajn erarojn kaj mankojn. Ili devas konsideri, ke pli facile estas kritiki ol labori. Necesas vidi la malfortan Esp-rondeton en Otrokovice, kiu kvankam sen-antaŭaj spertoj, lerte kaj kurage kapablis solvi tiel grandan aferon, kiel estis nia TUTŬTATA kaj ne hezitis plenumi grandajn taskojn, kvankam la situacio ne ĉiam estis por ili favora. Ni estu al ili dankemaj kaj eventualaj mankoj estu al ni instruo por la estonto.

Nun ni preparu la 2an TUTŬTAT-AN! Estas proponoj, arangi ĝin venontjare en iu urbo de Bohemio au en Slovakio. Rondetoj, kiuj havas kuragon kaj eblecon ĝin arangi, jam nun diskutu ĉi aferon kaj donu al ni proponojn. En generala diskuto, kiun ni malfermos en "L.P." ni poste findecidos kie ĝi okazu.

Rud. BURDA

EN BULGARIO AL HELSINKI

Post longaj klopodoj la Bulgara Esperanto Asocio /BEK/ sukcesis elsendi la 14/6. sian oficialan delegiton, k-don, Georgi DOLAPĈIEV al la Monda Packongreso en Helsinko. La sofiaj tagjurnaloj sene kiel Radio-Sofia anoncis la forveturon de k-do. Dolapĉiev kiel reprezentanton de la bulgara esp. pacmovado. La tutan vojaĝon kaj ceterajn vivelspezojn pagis la ŝtato.

C. MURGIN

MALVERAĴOJ KOMPROMITAS NIN

Lastatempe disvastigis la famo, ke en la konata Lomonosov Universitato de Moskvo estas enkondukitaj Esperanto-instruado kaj funkcias katedro kun kelkaj Esper-

anto-profesoroj. Tiu ĉi parolo ne bazas sur faktoj. Nome: se kelkaj gestudentoj de la menciita universitato private lernas Esperanton tio ankoraŭ ne signifas, ke ĝi estas oficiale instruata en la universitato. Do, estonte ni estu pli atentaj, ĉar malverajoj servas eble por mallonga tempo, sed por la daŭro ili povas pli domagi al nia movado.

E. BOKAREV

CANKO MURGIN VIZITOS ĈSR.

K-do. Canko MURGIN, scienca laboranto en ekonomia fakto de "K. Marx" Instituto en Sofio esperas ricevi vojaĝpermeson por unuonata restado en Ĉeĥoslovakio. Li prelegos pri socialisma konstruado kaj Esp pacmovado de Bulgario laŭ ebleco en diversaj urboj de nia lando.

Ĉar tiu ĉi k-do. estas jam konata al niaj legantoj pere de siaj revoluciaj kaj porpacaj poemoj, kiujn publikis nia bulteno, li certe estos de ni ĉiuj kun granda intereso bonvenigata.

la red.

NI SALUTAS NOVAN KUNBATALANTON

La Bulgara Esperantista Asocio kaj la Bulgara Esperanto Kooperativo en Sofio ĵus eldonis la unuan n-on. /junio/ de sia landa bulteno sub la devizo: "Per Esperanto Por la Mondpaco!" Ni kore bonvenigas ĝin en la espero, ke ĝi daŭre pli kaj pli servos al la starigita celo. Kvankam tiu unua n-o. estas tre modeste multobligita bulteno, ĝi tamen signifas novan gravan argumenton en la manoj de la ceteraj popoldom. gek-doj, ĉar ĝi jam havas fakton, ke kron en Ĉeĥoslovakio ankau en Bulgario nja movado vivas kaj kreskas. Ankau al niaj sovjetaj gek-doj ĝi bone kontribus al fondo de Sovjet-Unia Esperantista Pacmovado.

Ni komentas, ke ĝia enhavo estas vere interesa informaro por la ĝis nun izolitaj bulg. esperantistoj kaj ankau por eksterl. gek-doj. Ni nur notas, ke la titolo "BULTENO" estas nenion diranta. En la titolo devus esti videbla la celo. Ĉu vi ne povus doni pli taŭgan nomon? PARABONO: por Bulgario = 6 levoj. Mendebila ĉe: Bulg. Esp. Kooperativo, Bulvard Stalin 40, SOFIO, BULGARIO. Por Ĉeĥoslovakio jarabono: 13.-Kĉs Mendebila ĉe nia redakcio.

ALVOKO DE ĈINAJ SCIENCISTOJ

Sciencistoj tutmondaj ! jam sonas la trumpeto por la tutmonda liberigo, jam estas tempo por nia liberigo. Ni devas akuzi al la mondo la krinajn monopolfarojn de tiuj ĉi sciencaj organizoj internaciaj. Ni volas forjeti tiujn absurdajn regulojn. Ni volas adopti la simplan, facile lerneblan internacian lingvon Esperanto, kiel scienca lingvon por internacia uzado kaj publikigi en ĝi niajn verkojn. Oni devas fari regulon, ke scienca studo validigas nur, se ĝi estas publikita en Esperanto. Ni volas uzi ĝin plie, kiel ilon de kunlaborado kaj lukti per ĝi por la interkompreno kaj feliĉo de la homaro kaj daŭra paco en la mondo.

Progresemaĵ sciencistoj tutmondaj, ekkritiku iliajn krinojn! Adoptu Esperanton por viaj verkoj /skribu almenaŭ viajn resumojn es- perante! /Ekrespondu al nia alvoko per praktika agado!

- Prof. Lo Chou/Entomologio/, profes.
- Hsien Dzeh Hsiu/Zool./, prof.
- Tien Ku Chu/Mekaniko/, prof.
- Shu Chi Su /Agronomio/, prof.
- Shi-yuan Yu/Geologio/, prof.
- Kwang yu Chu/Medicino/, prof.
- Huai Chiu/Animalnutrado/, asst.
- prof. Hanwen Wang/Agronom./, asst. pr.
- Shi-pin An/Animalnutr./, asst. prof.
- Teh-jen Lu/animalnutrado/, profes.
- Meng-chiu Lan/Chemio/, prof.
- Chen Hwa Wang/Botaniko/, prof.
- Chi-hung Wang/Agronomio/, prof.
- Yin Yuan Pai /Arbokult./, prof.
- Hwa Sau/Gardenkulturo/, prof.
- Tsu-ping Cheng/Fiziko/, asst. prof.
- Chinsbeng Lu/Entomologio/, asst. prof.
- Kuosi Lu/Gardenkult./, asst. prof.
- Ho-nin Wang /Animal./, asst. prof.
- Yua-chi Chai /Agronom./

Adreso: Profesoro, d-ro, Lo CHOU, Chang Chia Kang, S H E N S I , C i n i o.

BONVOLU KOREKTI:

sekvanta teksto devas esti antaŭ la supre skribita alvoko kaj subskriboj:

Karaj progresemaĵ sciencistoj tutmondaj !

Scienco, kvankam ĝi estas la kristalajo de homara sageco kaj sekve komuna trezoro de ĉiuj nacioj en la mondo, estas ĝis nun monopolita de kapitalistoj kaj imperialistoj. En la estinto ĉiuj sciencaj organizoj internaciaj agis, intence aŭ

senintence, kiel kunkrimuloj, ĉar almenaŭ ili estis egoismaĵ. Ili, tiuj organizoj, faris regulojn, ke oni devas publikigi la rezultojn de ĉiuj sciencaj studoj nur en la lingvoj: angla, franca, germana, itala kaj latina, se oni volas, ke la rezultoj estu konsiderataj kiel validaj. Tiamaniere la fruktojn de la elpensado kaj eltrovado forrabis la imperialistoj, kapitalistoj kaj egoismaĵ sciencistoj, kaj la plejparto de tutmondaj popoloj estas konsekvence forpelita el la "eburturo" de scienco.

La sciencistoj, kiuj malfacile parolas aliajn lingvojn kaj kiuj deziras tamen fari ian elpensadon aŭ kreaĵon en siaj propraj sferoj, devas necese eluzi pli ol duonon de sia vivtempo por ellerni du aŭ tri fremdlingvojn, ĉar aliel ili ne povas digesti la konojn jam ekzistantajn, des malpli fari ian indan kontribuon. Tia trokonsumo de tempo kaj energio estas vere la nekompensebla perdo de scienca rondo. Jus pro tio la alilingvaj landoj estas ofte mokitaj kiel postigantaj, necivilizitaj kaj devas esti agresataj aŭ nallevigiti en koloniojn. Kiel maljuste!

Scienco ne estas konserveca aŭ merkantanta afero, ĝi kiel alispecaj kulturoj internaciaj, povus esti antaŭenpuŝata nur per konstanta interkomunikado kaj interkurendigado. Scienco celas servi la popolon kaj se oni volas, ke la fruktoj de diversaj fakoj de scienco estu akceptitaj kaj guitaj de la popolo, do devas esti iu facila populara ilo, per kiu la popolo proksimigas al la fruktoj. Tiu ilo ne povas esti alia ol Esperanto, la internacia lingvo, kreita antaŭ duonjarsento. Ĝi estas kreita servi la popolon por ke malsanlingvuloj interkomprenigu kaj por ke la popoloj per ĝi eniru pli feliĉan mondon, epokon, tion sopiratan de ĉiuj. Estas videble, ke Esperanto kaj scienco koincidas en siaj celoj, servi al la popoloj. Estus certe granda beno por la homaro, se ili - Esperanto kaj scienco - kunirus kaj kunlaborus.

/nun daŭrigu ĉe la unua kolono/

INTERPACA MOMENTO

La tero, tiu tero, kien rapide oni malaperigis la mortigitojn, movigas.

La tromulto da viktimoj, troa rilate al la eta interpaca momen-
-to, okazigis ke la soldatoj rapi-
-de, tro rapide, enjetis siajn kun-
-militintojn en grandan fosajon
tiaj malfermitan.

- Rapidu, vi rapidu... Antaŭ ne-
longe la bestuloj rekomencos la
atakon!

- Tiom da viandaĵo... Tio certe
kauzus guegon al buĉisto en hom-
manga lando.

- Vi ne ŝercu, 35...

- Ĉu? Mi ne ŝercas. Sed mi ne
povas nepripensi la laboron, la
penon, kiujn puporiparisto sentus
por ekkoni la posedintojn de ti-
om da brakoj kaj kruroj. -

- Silentu, la kapitano....

- Rapidu, rapidu, do, knaboj... krias
la kapitano - Ĉu la ĉerktruego
estas jam sufiĉe profunda?

- Mia kapitano - informas la te-
lefonisto - la generalo ordonas
rapidigi pli la returmarsĥon, ĉar
noktigas kaj, laŭ lasta informo,
la malamiko preparas atakon kun
granda soldatnombro tiu ĉi foje.

- Rapidu do, rapidu, plenigu la
fosajon... la oficirojn supren-
tiel... tiel... nun la standard-
on... Teron, teron sur ĉio! ...

+ + +

La tero, tiu tero, sub kiu la
mortigitoj malaperis - movigas..

La vento bojegas.

La nuboj, blankaj kolomboj, kies
aron pafotimigis kaj dispelis,
tremantaj ekforflugas.

La luno sur la ĉielo, vane ser-
-ĉas kien sin kaŝi, tre pala, tre
ĉagrenita.

Ĝi pravas.

Estas abomena la milito...

Sur tiu ĉi duona parto de nia
planedo ja estas nokto kaj la
luno brilas. Sed interne, en la
tero, la nokto ne ricevas la lun-
lumen, ĉio ja estas tute nigra
kaj nespirebla....

Unu el la enterigitaj oficiroj
la leutenanto Moura, ankoraŭ ne
mortis.

Li sentis la vivon post la sve-
-no, sed sentis ankau, kontraŭ sia
buŝo, antaŭ siaj pulmoj, sur sia
vundita brusto, standardon kaj te-

-ron, pezajn standardon kaj teron.
Li provas barakti kaj la tero
movigas.

Li penas enspiri almenaŭ iomet-
on da aero, el tiu aero, kiun li
scias ekzisti ekstere. Volonte li
donacus la tri lastajn minutojn
de sia vivo, kontraŭ unu, unu nura
enspireto....

Per la perforte fermitaj okuloj
li vidas la tre kaman edzinon, la
malgrandan filineton....

-Mi vivas... Mi vivas...

La fingroj, kurbigas, la trunko
kvazau tordigas pro la nemezureb-
la morala afflikto kaj, en turnant-
iga lasta agotio, liaj dentoj nor-
das la standardon, kiu ne permesas
al li almenaŭ lastan konsolan en-
spireton.

+ + + + +

Ankaŭ nokte, sed en paca ĉambro
Tre juna patrino kuŝigas en
puntgarnitajn lullitukojn, trijar-
an blondulineton.

- Panjo, ĉu paĉjo?

- Paĉjo foriris, Li estas tre mal-
-proksime, sed li alvenos. Mia fili-
-no estas pregonta kaj petegonta
de Dio la plej baldauan alvenon
de sia patro.

- Jes panjo - kaj interplektan-
te la fingretojn ŝi pregas -
Granda Ĉiela Patro, permesu vi, mia
paĉjo venu baldau al mia patrino
kaj al mi. Mi estas ĵia tre amik-
ino kaj patrino ankau. Sendube Vi
nevolas ĉagreni Vian ulineton. Se
Vi faros tion al mi, mi ĉian estos
brava, kaj neniam, neniam plu mi
ĉagrenigos panjon. Dio - benu min!

La patrino genuas ĉe la lulilo
kaj piete kaj fideme pregas. Ŝi
estas certa, ke la Dio, pro ŝiaj a-
mo kaj pieco, tute protektos ŝian
karan, ŝian tre karan kaj bonan
edzon.....

Saldanha CARREIRA

KIEL MI PENSAS....

Mi trovis, ke "LA PACDEFENDANTO"
estas Esp-bulteno, kiun devus ĉiuj
legi kaj koni. Ankaŭ mi estas por
la paco kaj libereco, sed, kiel mi
pensas, paco kaj libereco devas es-
-ti monopolo de neniu: nek Okcid-
enta, nek Orienta, ĉar tiujn du ce-
lojn aspiras ĉiuj popoloj. -

Mi estas "Mondcivitano" deziran-
-ta nuligi ĉiujn landlimojn tiel,
ke ĉiu povu partopreni la movadon
por la paco de la homaro. -/dauri-
g^o sur 7.p./

KIEL MI PENSAS.../Daŭrigo/

- Mondcivitanoj estas anoj de "Mondcivitana Respubliko", kiu estas tute nova socia kaj politika kreaĵo de sendependaj popoloj sen landlimoj kaj armeoj, kies sola celo estas servi sendistinge al ĉiuj popoloj. - Neniu mondciitano povas partopreni mortigon aŭ yundigon de homoj dum milito aŭ toleri ian rasan distingon. La mondciitateco ne pretendas politikan aŭtoritaton super naciaj ŝtatoj, sed ĝi pretendas esti politike agnoskita.

Vittorio CANDOTTI
UDINE - Italio

Rim. de la red.: Mondcivitanececo estas en Popoldemokratioj identigita kun ysona kosmopolitismo kaj ni ankau forte kredas, ke Mondcivitanececo estis kreita nur por la celo forlogi la revoluci-emajn homojn de praktika batalo kontraŭ la usonaj atomminacantoj kaj ekspluatantoj, por ŝtultigi la homojn per belaj, sed tamen iluziaj frazoj. Antau ĉio necesas, ke venku la progresema homaro, senarmigu militinstigantojn kaj sekurigu la mondpacon kaj liberecon de ĉiuj popoloj, kies memkomprenebla konsekvenco estos, liberaj landlimoj por ĉiuj homoj kaj ŝtatoj sen armeoj.

ESPERANTO EN LA PAKKONGRESO

Unuafoje publike eksonis Esperanto en internacia kongreso de pacdefendantoj en Helsinki. La estraro de Monda Pakkonsilantaro invitis delegitaron de MEM, partopreni ĉi kongreson. MEM sendis kiel ofic. delegiton k-don. Knut Hagström, prezidanto de la tramvoĵista sindikato kaj membro de stokholma Esp-pacrorondo. K-do. Hagström estas 57jarulo, sed elokventa parolisto. Ne estis facile ricevi dum la kongreso la rajton paroli, ĉar tempo estis nur unu semajno, 2.000 reprezentantoj el 90 landoj, kaj ĉiu havis la deziron ion diri.

La kongreso dividigis en diversajn fakkunvenojn, Hagström tamen trovis eblecon paroli en la kunveno de kultura komisio, kiu estis granda kaj kie lia parolado havis gravan signifon. Estis 6 oficialaj lingvoj devigaj: la rusa, germana, ĉina, hispana, franca kaj angla. K-do. Hagström parolis

esperante kaj la kanarado tradukis liajn vortojn. Li bone propagandis Esperanton kiel praktikan ilon por la pacdefendo, kion atestis la ricevita aplaudo.

Poste li kolektis kun helpo de finnaj k-doj Korkeamäki kaj Heikkinen la partoprenantajn esperantistojn. Mikrofone li alparolis japanan delegitaron kie li trovis virinon parolanta nian lingvon. Finfine kolektigis al aparta konferenco esp-delegitoj el Svedio, Japanio, Finnlando, Rumanio, Bulgario kaj Usono. Estis decidita rezolucio, kiun oni transdonis al la kongresprezidantaro kaj skribita detala protokolo por la estraro de MEM. Ĉiuj niaj gek-doj bone propagandis nian lingvon, precipe la Japanoj alportis kune abundan esperantan pacliteraturon.

Kiel ni jam informis, okazis post la kongreso iuona pac-ekspozicio, instalita de esperantistoj en urbo Turku. Ĝin vizitis 2 Hindoĵ. Unu el ili k-do. Boĝe, kantist hindan packanton antau mikrofono. Ĉeestis ambasadoro de Hungario kun kelkaj ataseoj krom 13 Hungaroj, inter ili kelkaj eminentaj personoj el la pacmovado. Akademiano Erzsebeth Andics tre laudis la arangon kaj altan signifon de tia internacia ekspozicio. Ĝi finis per la vortoj: Ni arangos egalan en Hungario. La viziton de pluaj kongresanoj ni ankoraŭ atendas.

Laŭ informoj de
k-do. Niilo KAVENIUS.

28a KONGRESO DE "SAT"

okazos de 6a-12a agusto 1955 en LINZ /Aŭstrio/. La kongreskomitato jam en februaro invitis al tiu kongreso reprezentantojn de kelkaj popoloj. landoj, inter ili ankau ĉehoslovakian. Bedaurinde la Centra Sindikata komitato ROH gis nun tute nerespondis tiun ĉi inviton.

42a KONGRESO DE JAPANAJ ESP-ISTOJ

ĉe KANSAI LIGO DE ESPERANTO-GRUPOJ okazos la 27-29an de agusto en Osaka. Bedaurinde neblas sendi delegiton, sed en la nomo de ĉehosl. pacdefendantoj estis sendita mesaĝo al la kongresokaj samtempe ankau en la nomo de MEM, ĝia estraro kaj membraro, ties prezidanto salutis ĉiujn kongresanojn.

ANKORAŬ PRI LA TUTŜTATA

La I. tutŝtatan konferencon de esperant. pacdefendantoj en Otrokovice partoprenis reprezentantoj el jenaj lokoj:

Fuŝtá Polon, Kutná Hora, Valaŝské Meziříčí, Zupanovice, Sušice, Šlapanice, Ostrava-Mar, Hory, Koprivnice, Karlovice, Mor. Třebová -Linhartice, Brno, Bratislava, Horská Bystřice, Pardubice, Ořechov-Polešovice, Plzeň, Ropice, Příbor, Frýštát u Gottwaldova, Gottwaldov, Liberec, Poprad, Opava, Třinec, Olomouc, Vracov okr. Kyjov, Kroněříž, Praha, Luhačovice, Košice, Vozovice, Spálené Poříčí, Poruba u Ostravy, Michálkovice, Hradec Králové, Prostějov, Molešov, Bohumín, Vítkovice, Dobšiná, Lomnice n. Popelkou, Louny, Zlínice, Hájky u Nové Bystřice, Porštejn n. Ohří, Dolní Bludovice, Brno-Zidčovice, Albrechtice, Galanta, Hor. Radice, Martin, Karviná, Čtyřicet Lánů, Místek, Mlýny p. Kytlice, Trenčín, Svit, Bardejov, Jablonec n. Nisou, Ostrava-Kamenec, Ostrava-Hulváky, Havlíčkův Brod, Uherský Brod, Rýmařov, Rumburk, Janovice u Rýmařova, Plešnice, Popůvky u Brna, Batošov u Ostravy, Chrudim, Sokolí p. Třebíč, Doksy, Mar. Lázně, Suchdol, Ústí n. Labem, Kunčice, Prakovce, Lanžhot, Hořice v Podkrkonoší, Přerov, Oldřichovice, Žilina, Trnava, Břeclav, Horní Bojanovice, Ostrava -Zábřeh, Ostrava-Hrabůvka.

El eksterlando ĉeestis: k-do. Knut Hansen kaj Kovrint el Danlando, ing. Gustav Nilson kaj Karl Kvist el Svedio, Heudebine kaj Marcelle Robineau el Parizo, Helga kaj Rosa Wiendl-Austrio kaj Ludmila Van Sembeck-Usono. El multaj salutleteroj ni citas nur jenajn:

El Ĉeĥoslovakio: Dr. Aŭg. Pitlík el Praha, Theodor Cejka-Bytřice, Otto Sklenčka-Teplice. A. Rohlíková el Praha, Ĵ. FOK, Chválečice p. Bíteš, Julie Šupichová, Stan. Kamarýt, Evž. Belda, Skála V. Grupo-Prakovce, A. Csáder-Bratislava, Kraj. Správa - Kniha-Gottwaldov, Dr. Vaněk-Nová Role, Okr. Dům Osvěty Třebíč.

El Eksterlando: E. Bokarev-Moskvo, V. P. Piŝarov-Kujbyŝev-Sovjet Unio, Sindikata Esp. Asocio-Márton Lajos-Budapeŝto, Paul Balkányi, MEM-peranto-Hungar. Pola Esp. Asocio de Wrocław kaj de

Krakow, ing. Zdislaw Glajcar el Ciescyn-Polio, Helmut Löffler-MEM-peranto por Germanio, Esp-istoj el distr. Pirna-Saksio, E. Rosner Olsnitz-Saksio, B.A. Velev-MEM-peranto por Bulgar. Esp-soc. Radio-Pazargik, Esper. Kooperativo-Sofio, Petko Arnau-dov-Sofio, Ganko Murgin-Sofio. A. Balague-Sankt Pölten-Austrio W. Gilbert kaj Jean Dalot por la Esp-paŝkonitato en Francio, Bertil Englund-Svedio, Org. Kom. de 42a Esp-Kongreso en Osaka, H. Sakaguchi, prez. de Esp-grupoj ĉe Universitato en Kioto kaj Fremdlingva Kolegio en Osaka, Nita Vrinceanu-MEM-peranto por Rumanio, Julio Osapó Kinizsi-Satu-Mare-Rumanio, Sal. Carreira-Portugalio, Klio Khwat Liat-MEM-peranto por Indonezio, Niilo Kavenius-Finnlando kaj Frode W. Hansen el Danlando.

Oficiale salutis la konferencon reprezentanto de la Uzina klubo "SVIT" el Otrokovice, kiu aranĝis la konferencon, k-do. Vybíralík en la nomo de la Komunista partio kaj k-do. Josef Hošek por la Nacia Komitato/urbeŝtraro/.

La financa situacio: La profito el la Tutŝtata kompreneble egalas nulon, ĉar kovri ĉiujn elspezojn estis malfacila tasko kiam ni petis de ĉiu aliginto nur 10.-Kĉs kotizon. Nur la reklamoj kaj poŝtelspezoj kaŭzis grandan eldonon. Krom tio ni verŝajne pagos ankau luon por la kunvenejoj. Ĝis nun nia rondeto en Otrokovice elspezis preskau 2.500.-Kĉs.

Ĉiuj legantoj de L.P. ricevas kun tiu ĉi n-ro. samtempe la aprobitan "Rezolucion", kiun ni sukcesis pretigi en preŝejo -Plzeň. Ĝi estas Esp-kaj ĉeĥlingva, kaj ni esperas, ke niaj gek-doj ne nur klopodos plenumi la aprobitajn decidojn, sed ankau uzu tiun ĉi REZOLUCION kiel efikan propagandilon inter neesp-istoj. Samtempe ricevos ankau ĉiuj societoj kaj individuoj salutintaj ni en konferencon kun ĉi Rezolucio specialan dankleteron. En Popoldemokratioj niaj k-doj eluzu la okazon, montru la rezolucion kaj postulu samajn rajtojn de viaj oficialaj instancoj. La rezolucio havas aprobon de nia Nacia Komitato en Plzeň.

Kara kamarado! Permesu ke ni iom rakontu pri mi mem:

El la multaj leteroj senditaj al nia k-dó, B. Bokarev, kies kopiojn ofte ricevas ankaŭ nia redakcio, ni publikas ĉi sube interesajn ekstraktojn el letero de ĉina k-dó, LIU Zyn el Mukdeno:

"...kun granda gojo kaj plezuro mi legis vian leteron kaj anoncon en la PACDEFENDANTO kaj rapidas al vi sendi katalogon de Esperanto eldonadoj de nia Popola Ĝinio.

Mi ne povas kompreni, kial en via Sovjetunio la Esp-movado estas tre silenta kaj malaktiva. Ĉu Esp-o ne estas bona komprenilo por popoloj tutmondaj? Ĉu oni ne povas uzi Esp-on por la granda afero, la mondpaco?

Jen mi recitas la paroladon de via granda rusa verkisto Maksim GORKI, por ke vi sciu la valoron de nia granda Esperanto: Maksim GORKIJ: "PRI ESPERANTO" okaze de debato rilate internacian lingvon en popola komisariejo por klerigo en 1919.....

"Konservativa opinio obstine argumentas, ke Esperanto estas utopia elpensajo. Sed la viva, laŭregule evoluiganta realo malrapide, sed des pli energie refutas la argumenton de la konservativuloj.

La historio de la kulturo konvinke pruvus, ke la plej sentimaj gvidantoj de la homaro sukcesis dum sia vivo efektiviĝi multe da "Frenezaj nevoj" kaj, ke tiuj ĉi "SENSENCAJ UTOPIOJ" ĉiam pli ofte ŝanĝigas en kreajn hipotezojn de sciencoj.

...Miaopinie - Esperanto estas saĝa kaj ja plua evoluigokapabla germo de internacia lingvo. Jam nun Esperanto havas konsiderinde ampleksan literaturon kaj teorie gi tute sukcese evoluigas. Tiu ĉi pene klopodis liveri al vi regulaboro progresos konsiderinde pli rapide, kiam en gi partoprenos kleraj filozofoj, nome tiuj, kiuj estas konvinkitaj pri la nepre bezono unuigi la homaron.

Mi estas plene konvinkita, ke la organizita volo de amasoj estas plene kapabla transformi "ARTEFARI-TAĴOJN" je aĵoj naturaj.

Tion nei, ne estas eble. Tial do oni devas konsenti pri la nepre neceso, de la kreo kaj disflorigo de tia lingvo.

Mi naskiĝis en 1930 en tre malriĉa kaj malfeliĉa familio. Nun mi laboras kiel teknikisto en fabrikejo de nia Popola registaro.

Mi malfacile ellernis la lingvon japanan, anglan kaj poste la rusan. Sed mi tre facile memlernis Esperanton en 1953 kaj jam korespondadas kun esperantistoj el la tuta mondo. Mi laboras por Esperanto por la mondpaco kaj precipe inter la junularo. Mi estas fondinto de la "LUK" - organizo kaj mi ĉiam tradukas bonajn infanlegaĵojn....."

Ĝis ĉi tie LIU Zyn el Mukdeno.

Certe ne ĉiu el niaj legantoj konas la proklamon de fama sovjeta verkisto Maksim GORKIJ, do legu kaj eluzu gin ankaŭ kiel trafan argumenton kaj armilon, kontraŭ la "vialandaj konservativuloj"! La redakcio

AL NIAJ ABONANTOJ !

Multaj dankleteroj el en- kaj eksterlando atestas la gravan rolon, kiun ludas dum tutaj kvar jaroj kaj ankoraŭ nun nia cirkulero "LA PACDEFENDANTO". Sed necesas, ke vi ankaŭ vidu en ties poŝon. Nome, ni daŭre baraktas pro financaj malfacilaĵoj. Multaj eksterlandaj gek-doj ricevas nian bultenon aŭ senpage aŭ kontraŭ sendo de ofte nur bagatelaj rekompencajoj. Multaj ĉeĥoslovakaj abonantoj ankoraŭ nun, kaj estas jam la dua duonjaro, ne renovigis sian jarabonon. Ĉu la kelkaj vere oferemaj kaj aktivaj gek-doj daŭre per sendado de "MUNICIO" subtenu la oportunismon de la malaktivuloj? Tio ĉi jaro ni kaj ekagu! Nia redakcio kaj ad-

ministracia aparato laboras tute senpage. Mi mem jam devis investi 2mil kronojn, por povu aperigi L.P. El tiu kaŭzo vi ricevas ĉi n-on, por du monatoj. K-dó. Matirko el Košice pruntis de-paperojn por 100 Kčs. K-dó. Lička donacis jam duan fojon po 70 Kčs

por poŝtmarkoj, por pova ekspedi la gazeton PACO al niaj abonantoj. Al nia distribuanto en Kopřivnice, kiu malgraŭ sia senprofita laboro, kiun kauzas, al li la distribuado de LP, ankoraŭ el propra poŝto pagas la a-franken, ni ankau ŝuldas monon.

Do gravaĝ trovi eliron en tiu ĉi situacio au estonte kontentigi sin per pli malampleksa, eble 4-6 paga eldono.

En 1954 niaj enspezoj faris Kčs 12.599.30 kaj la elspezoj 12.907.17. El tiu sumo elspezoj por papero, kovertoj kaj presado de titolpag faras 4.675.97 Kčs, poŝtmarkoj por gazetafrankado kaj korespondado de la redakcio kun abonantoj 1.864 Kčs, kaj nur por la multobligado ĉe privata instituto ni pagis 4.688.-Kčs. Do komparu kiom da jarabonoj po 12. Kčs necesas havi por kovri ĉi tiujn elspezojn kaj fine la abonantaro en la 1955a jaro multe kreskis, dume la pago de jarkotizoj stagnas. Do stato notolerebla! Se ni trovas intertion multe da esperantistoj almenaŭ rondeton, kiu surpronus la multobligadon per nia propra maŝino, kiu kuŝas pasiva en Otrokovice, ĉar niaj tieaj gek-doĵ pro ampleksa laboro kun la distribuado ne sufiĉas ankoraŭ multobligadi, ni ŝparus jare pli ol kvin mil kronojn, kaj tiu sumo ankau sufiĉus por egaligi la deficiton. Sed malgraŭ kelkfoja alvoko, kaj laste en Otrokovice dum nia Tutŝtata ankoraŭ neniu rondeto aligis.... Do serioze pripensu ĉi problemon kaj ekagu laŭ via konscienco!

+ NI FUNEBRAS +

En la urbo Bohumín mortis meritplena prezidanto de la loka Esperantorondeto k-do. Alfons K e r m e l.

Ankoraŭ kun aliaj samideanoj li meritas la konstruon de Esp-monumenteto en la urba parko en la jaro 1954. Ĉi monumenton perforte forigis germanfaŝistoj dum naziista invado en 1939. Post la liberigo en 1947 estis dankal k-do. Kermel konstruita monumento tute nova. En 1953, laŭ deziro de la urba konsilantaro, estis la monumento translokita al pli taŭga loko. Tiam laŭ informoj, la financajn elspezojn plejparte kovris deneve k-do. Kermel.

Kiam la prezidanto de la grupo ĉesis labori kaj flankigis, Kermel fariĝis lia anstataŭulo kaj kun malgran-

da grupo da oferemaj gek-doĵ., Trombala, Razska ktp, li daurigis la batalon por nia afero en urbo Bohumín de regiono Ostrava.

K-do. Kermel ege deziris ĉeesti nian TUTŜTATAN en Otrokovice, sed bedaŭrinde subita malsanigo ordo-nis lin al hospitalo/peritoneiton kaj ventro-akvo/, kie li post operacio subite mortis en ago de 64 jaroj.

Ĉe la funebra ceremonio, kiu okazis la 14. de julio, multaj konstatis lian oferemon kaj aktivecon por Esperanto kaj mondpaco. Super la tombo kun li adiauis k-do. Fr. Lička kaj Vladimír Slaný el Ostrava en la nomo de nia granda esperantista familio.

Same malgojiga raporto atingis nin el urbo Vrútky en Slovakio. Tie mortis la lan de julio oferema kaj aktiva esperantisto k-do. KORNEL CHLADNÝ.

Honoron aŭ ilia dumviva agado, kiun ni daurigu kiel ekzemplon!

KIEL APEROS GAZ. "PACO"

La julia n-o. venos el Svedio kun ioma malfruigo, kiun kauzis trookupiteco de la presejo kaj foresto de k-do. Kvist, kiu partoprenis nian TUTŜTATAN. La venonta n-o. eldonigos en Ĉeĥoslovakio kiel duobla por aŭgusto-septembro. Ĝin vi ricevos komen-ce de septembro. Event. raportojn kaj anoncojn sendu plejmalfrue ĝis la 20a de aŭg. al nia redakcio, R. Burda, Palackého nám. č. 6, PLZEN, Ĉeĥoslovakio. La nov. n-o. tre verŝajne eldonigos jam en Bulgario kaj la decembra en Aŭstrio, se ne aligos nova landa eldonanto. Gek-doĵ en C.S.R. kiuj ankoraŭ ŝuldas la jarabonon, rapidu ĝin egaligi, se vi ne volas, ke ni transdonu vian abonon al alia interesulo.

BUSTO DE D-ro ZAMENHOF

Ĉi devus esti en ĉiu biblioteko kaj en ĉiu hejmo de niaj gek-doĵ. Prezo: 20-40.-Kčs.

Por via korespondado uzu nur nian pacpropagandan belan leterpaperon kaj kovertojn. Ankau poŝtkartoj. Esp-insignoj, divers-

speca propaganda materialo, aĝis lia anstataŭulo kaj kun malgran-ĉetebla ĉe J. REISER, Kraj. správa spoĵů, Tylova ul., PLZEN.

NIA MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

PLZEŇ, la 29/6an en membrokunveno, kiun partoprenis pli ol 40 gekdoj el nia urbo kaj gastoj el Rokycany, Nýřany kaj Plasy, ĉeestis ankaŭ k-dino Marcelle Robineau, red. de "LABORISTA ESPERANTISTO" el Parizo kaj k-do. Paulo Tula/konencanto/el Albanio. K-dino Robineau estis 2 tagojn en Plzeň, kiun ŝi detale trarigardis kaj ankaŭ vizitis la mondfam-an bierfabrikon "Prazdroj-Urquell" kie nia k-do. Frant. Kalný al ŝi montris la tutan procedon de bierkuirado. Vespere ŝi parolis en nia klubo pri la Esp-pacmovado kaj la vivo en Francio. Poste ŝi veturis al Praha por esti gastoj de familio Zedník en Modřany, antaŭ la forveturo al nia Tutŝtata.

PŘÍBOR, Okaze de la 10jara evoluo de nia urbo estis aranĝita granda ekspozicio en nia muzeo. En tiu es kadro trovis lokon ankaŭ Esp-angulo, kiu vekis la intereson de muzeaj laborantoj el Opava, kiuj dufoje fotografis gin. Nunja -ra Somera Kursaro ne okazos en Příbor, ĉar ni ne volis ĝeni sukcesan procedon de nia Tutŝtata.

BRNO, la Esp-rondeto de Kult. Domo kunvenas ĉiu mardo de 19.30 horo en "Hotelo Slovák", Lidická str 23 ĉiam interesa programo, aktualaj informoj, konversacio kaj amikaj diskutoj.

KOPRIVNICE, nia rondeto estas daŭre okupata per nura distribuado de LA PACDEFENDANTO. Ĉu ne alia rondeto povus ĵari ĉi laboron?

PLZEŇ-MOSKVO-ŜANGHAI

Nia k-do. muntisto Frant. Kastner kiu veturis por muntado al Ĉinio, haltis kelkajn horojn en Moskvo. Tie li havis la feliĉon renkontigi kun k-do. Bokarev, kiu lin gastigis kaj montris vidindaĵojn de la urbo. Kastner, kiu jam trovigis la 14/7. en Ŝanghaj, el tie komisiis nin, diri al k-do. E. Bokarev siajn plejsincerajn dankojn por la afabla akcepto en lia logejo. Multon li spertis kaj post reveno li pretas fari kelkajn prelegojn pri sia vojaĝo kaj renkontigo kun esperantistoj.

LA UNUA ATOMELEKTREJO

8-paga verketo de d-ro R. Pawlik kiu priskribas la eluzon de atoma energio por pacaj celoj kontraste al ĝia misuzo flanke de usonaj militistoj. Aĉetebla ĉe k-do. Ján LAMACKA, Poď Sokolicami 1675, TRENČÍN, Ĉeĥoslovakio. Prezo: 2.20 Kčs.

FOTOJ DE NIA TUTŜTATA

Belaj fotoj/formato 12x18cm/unu peco po 4.-Kčs, 5 diversaj po 20.-Kčs. Aĉeteblaj ĉe nia redakcio. FOTOGRAFISTOJ-AMATOROJ! Senprokraste bonvolu sendi al nia redakcio po unu ekz. de ĉiu farita bildo kun indikita prezo, por ke ni povu akcepti mondojn de niaj legantoj. Ĉiun bildon indiku per n-o. Laŭ tiu ĉi n-o. ni ĉe vi mendos. Preferataj estas p.k. formato kaj 12x18 cm.

RADIO-BUDAPEST PRI ESPERANTO

Laŭ instigo de nia finnlanda k-do Niilo Kavenius la budapesta radio-stacio invitis k-don, Pál Balkányi al intervjuo antaŭ mikrofono rilate lia peresperanta paclaboro kaj korespondado. Li parolos la 27. de julio je ondo 252.75m de 17.30 horo en duonhora finlingva elsendo 10 minutojn hungare kaj esp-e kaj same je la 18.30 h. sur ondo 25.2 kaj 30.5m. La intervjuo ripetigos la 28/7. je 7.30 horo, ondo 252.75m.

Ĉeĥoslovakaj auskultantoj surbaze de ĉi spertoj, skribu amase al la Radio stacio Budapest, ke ĝi ankaŭ en vicigu intervjuon kun k-do. Balkányi dum la ĉeĥlingva elsendo de Radio-Budapest, ĉar valoras certe, ke pli ol 3000 ĉsl. esp. pacdefendantoj povu aŭskulti kaj facila lingvo internacia.

500a DISAŬDIGO DE RADIO-ROMA

La 1/4. Radio-Roma jubileis la 500 Esp-lingvan elsendon. Vi povas ĝin audi ĉiu merkredo k vendredo de 19.10-19.20 mezeuropa tempo per la ondoj 31.33 kaj 49.92 metroj. ROMA-RADIO certe meritas ricevi salut-kaj dankleterojn el la tuta mondo. Skribu ankaŭ vi !!!

POR VIA AMUZO KAJ PERFEKTIVIĜO

uzu nian "MIGRANTAN BIBLIOTEKON" Adr. A. Zmeškal, Seletná 2, PRAHA I.

K O R E S P O N D I D E Z I R A S :

Ordinara korespondanenco/3 linioj/kostas 3.-Kĉs aŭ 3 resp.kup.Ĉiu anoncanto estas petata almenaŭ unufoje per il.p.k.respondi al la ricevitaj proponoj.

K-do.Manfred KERZSCHNER,Ausburger str.83,DRESDEN A 21,Germanio-DDR./20jara/k.ĉ.l.pri sporto,filmo, literaturo kaj historio.

K-do.Nguyen van-KINH,3 Thuy-Khue, HANOI,Vietnam,k.ĉ.l.pri ĉiu teno, precipe pri kooperativa movado,interŝangas ĉion,speciale il.gazet.

K-do.Nguyen hai Trung,Hoi vannghe HANOI,Vietnam,/Same kiel la unua.

K-dino.Tiet Thank,Lien Hiep,Phu Nu,Vietnam,HANOI,same kiel lunua.

K-do.Dao-anh-Kha,T.N.V.N.,56 Pho Guan,su Vietnam,HANOI,same kiel la unua.

K-do.Tong-duc-Vien,Giac-te nhan dan,Vietnam HANOI,same kiel la 1.

K-do.Vu-nam-Dien,g.Thuy Khue,HANOI,Vietnam,same kiel la unua.

K-do.Dang-van Guan,/Cantho/12 Pho Chua Mot Cot,HANOI,Vietnam,same kiel la unua.

K-do.Huynh-van-Chau,Thanh nienn Lao-dong T.U. HANOI,Vietnam,same kiel la unua Vietnamano.

K-do.Borisoglebskij Aleksej Daniloviĉ,Plodo-ovocnoj institut de Miĉurin,GOROD MICURINSK,USSR,Sovjet-Unio,k.ĉ.l.

K-do.Jarda SAUER,ROHOZNÁ ĉ.219,u Poliĉky,Ĉeĥoslovakio,k.ĉ.l.pri amatora radiotekniko kaj kinomatografio.

K-do.LIU Zyn,261 Tajping Chieh,Peikwan Chu,MUKDEN,Cinio,/China/,kun ĉiulandaj revoluciuloj,filozofoj kaj sciencistoj pri humanismo,homaranismo,altruismo.

K-do.Karel CINCERA,Dělnická 474/112,DECIN 5,Ĉeĥoslovakio,kun ĉiuj landoj kaj ĉsl.geanikoj el diversaj lokoj per il.p.kartoj.

K-do.Georgi Ivanov Stanev,Str.V. Kolarov 22,SOFIA,Bulgario,kun gejunuloj pri ĉiuj temoj.Interŝangas il.p.k.kun ĉ.landoj.

K-do.Andrej KULLA,N.Internat I. Ul.A.Pietra,MARTIN,Ĉeĥoslovakio kun ĉ.landoj,interŝ.il.p.k.,muziknotojn por danĉo k.popolkant.

K-do.Zdeněk MINARČIK,Vysoká nad Kysucou 357,CADCA,Slov.Ĉeĥoslov.k.ĉ.l.interŝ.il.p.k,prospektojn.

K-do.P.I.ESSI,Str.Kizsi 27,TALLIN-Pjaskula,ESSR-Sovjetunio,Kun popoldemokratioj speciale.

K-do.Fedotov Johan Platonoviĉ,Str.Vokzalnaja 134 kv I.KUJBYSEV USSR,Sovjet Unio,kun ĉ.landoj.

K-do.V.P.PISAREV,Str.Ĉapajevskaja 100 kv 2,KUJBYSEV,USSR,Sovjet-Unio,kun ĉiuj landoj.

K-do.A.S.Vvedenskij,Testoj Krasnoselskij pereulok d w 6, kv 3, Moskvo,USSR,Sovjet-Unio,k.ĉ.l.

K-do.Saryĉev Sergej Vasilieviĉ,Ul.Osipenko d.w.56,kv.2,MOSKVO,USSR,Sovjet-Unio,kun ĉ.landoj.

K-dino.Nikiforova Nina Ivanovna,Mitnaja ulica d.w.23,kv.107 korpus 2,MOSKVO,USSR,Sovjet-Unio,

K-do.Ivan Ivanoviĉ PALKIN,ulica Mitnaja d.w.52,kv.19,MOSKVO,USSR Sovjet-Unio,kun ĉ.landoj.

K-do.Lavrentiev Konstantin Alexeviĉ,Sadovaja-Sanoteĉnaja d.w.2/12 kv 12,MOSKVO,USSR,Sovjet-Unio.

K-do.Spodobin Petr Ivanoviĉ,Ulica Svoboda d.w.20,GALIC,Gastromskaja oblast,USSR,Sovjet-Unio,k.ĉ.l.

K-do.Leon VACEK,Lidová ĉ.4,OSTRAVA-MAR.HORY,Ĉeĥoslovakio,pri teknikaj kaj sciencaj aferoj kun ĉ.landoj.Interŝ.il.p.k.Certe resp.

MUNICIO POR NIA BATALO:

K-do.J.Rýznar-Ĉtyřicet Lánů 2.-
K-do.J.Kavka-Praha 2.-
K-do.A.Lizna-Mor.Třebová 5.-
K-do.C.Fišer-Popůvky 2.-
K-do.J.Doležal-Petrovice 3.-
K-do.J.Bouda-Chlum p.Blatná 10.-
K-do.V.Skala-Plzen 10.-

Kĉs

K-do.J.Chonen-Ml.Boleslav 2.-
K-dino.J.Faltýnková-Val.Meziříčí 7.-
K-do.B.Hruška-Mar.Hory 3.-
K-do.Fr.Lička-Ostrava-Zábř. 70.-
K-do.L.Magera-Mar.Hory 3.-
K-do.d-ro.V.Mohapl-Olomouc 4.-
Ĉiuj akceptu nian koran dankon.

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO,TATRA,n.p. KOPŘIVNICE.
Redaktis: k-do.Rudolf BURDA,Palackého nám.ĉ.6,PLZEN,ĈEĤOSLOVAKIO.



REZOLUCIO



el la Tutŝtata konferenco de Esperantistaj Pacdefendantoj, kiu okazis la 7.—10. de julio 1955 en Otrokovice, Ĉeĥoslovakio, kaj kiun partoprenis 316 delegitoj el ĉiuj lokoj de Ĉeĥoslovaka respubliko kaj gastoj el pacbatalantaj rondoj de Francio, Svedio, Danlando, Aŭstrio kaj Usono.

La konferenco decidis alvoki ĉiujn esperantistojn en la popoldemokrata Ĉeĥoslovaka respubliko kaj en la tuta mondo, ke ili antaŭ ĉio uzu kaj disvastigu la internacian lingvon por kontraŭbatali ĉiuspecajn militinstigantojn kaj por sekurigi la mondpacon.

Por efektivi tiun celon estas necese, ke ĉiuj niaj rondetoj kaj grupoj intense kunlaboru kun la organizoj de la nacia pacmovado en siaj lokoj kaj landoj, donante al ties dispono por la internaciaj rilatoj nian lingvon kaj helpon en la sencoj de la decidoj de la Monda Packonsilantaro por atingi internacian kontakton en sferoj de scienco, tekniko, ekonomio, arto, literaturo, instruado ktp.

Kiel ekzemplon de tia kontakto, kiu estas grava faktoro de interpopola amikeco kaj mondpacon, ni menci la laboron de japanaj esperantistaj pacdefendantoj, kiuj per amasa dissendo de materialo pri teruraĵoj en Hiroŝima, Nagasaki kaj Bikini sukcesis vekti la konsciencojn de milionoj da homoj en la tuta mondo kontraŭ la uzado de amasmortigiloj, kaj la malgrandan grupon de esperantistoj en Otrokovice, kiu per sia esperantlingva alvoko sukcesis instigi milojn da homoj en Francio batali kontraŭ la rearmigo de okcidenta Germanio.

La konferenco montris, ke en Ĉeĥoslovakio estas progresemaj esperantistaj fortoj, kiuj organizitaj ĉe uzajn kluboj de sindikatoj aŭ en klerigaj institutoj tie baldaŭ manifestiĝis per meritplena rimarkinda laboro en la pacmovado kaj konstruado de socialismo. Multe helpis al ili la fondiĝo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), en kiu nia rolo estas grava jam pere de ties prezidanto, kiu estas nia samlandano, ĉar la celoj de MEM estas en plena harmonio kun la altnivelaj celoj de la Monda Packonsilantaro.

Lastatempe multaj decidoj konfirmas la kreskon de kompreno por niaj ideoj kaj celoj: la estraro de la Mondpackonsilantaro invitis delegitaron de MEM al la kongreso en Helsinko, la komitato de la Junularfestivalo en Varsovio invitis la esperantistan junularon al la Festivalo, la ĝenerala konferenco de UNESKO, kiel plej supera kultura instituto en la mondo rekonis oficiale dum sia kunsido en Montevideo la kulturen kvaliton kaj sukcesojn de Esperanto por la scienco, tekniko, edukado kaj internacia alproksimiĝo kaj lastatempe ni ankaŭ akiris la komprenon de plejaltaj sciencaj rondoj en Sovjet-Unio.

Surbaze de ĉi tiuj faktoj la konferenco aprobas, ke la ĝisnuna organiza stato de nia movado bezonas formigon de plinombra konsulta komitato de ĉiuj kluboj kaj rondetoj esperantistaj (TEKK), kiu ideologie kaj praktike ĝuste gvidus la tutan agadon de niaj esperantistaj pacdefendantoj kaj kiu penos akiri kunlaboron kun la nacia pacmovado sur pli larĝa bazo.

Tiu komitato ankaŭ klopodu akiri permeson por eldonado de regula esp. porpaca gazeto kaj por pligrandigi niajn fortojn per organizado de novaj rondetoj de esperantistaj pacdefendantoj. Niaj rondetoj komencu pli larĝan kunlaboron kun lokaj kaj distriktaĵaj packomitatoj. Ni ankaŭ devas pli vaste informi la publikon pri la sukcesoj, kiujn ni jam atingis en nia porpaca agado.

La konferenco esprimas sian konvinkon, ke per pluaj sukcesaj agoj, kiujn ni akiras en la pacmovado, ni baldaŭ atingos larĝan komprenon de nia popolo kaj de la respondecaj publikaj laborantoj.

Ni solene proklamas, ke ni esperantistaj pacdefendantoj klopodos varbi ĉiujn progresemajn esperantistojn al aktiva kunlaboro en la sencoj de tiu ĉi rezolucio, por kiel eble plej kontribui al la fina venko de socialismo kaj paco en la mondo.

Otrokovice, la 10. de julio 1955.

por la
Mondpaca Esperantista Movado:
Rudolf Burda, prez.

por la
Tutŝtata Esperantista Konsulta Komitato:
Josef Vitek, prez.



RESOLUCE



celostátní konference esperantistů-obráců míru, která se konala ve dnech 7.—10. července 1955 v Otrokovicích, Československu, a již se zúčastnilo 316 delegátů ze všech míst Československé republiky a hosté z kruhů obráců míru z Francie, Švédska, Dánska, Rakouska a Spojených států.

Konference se rozhodla vyzvat všechny esperantisty v lidově demokratické republice Československé a v celém světě, aby všechno úsilí při užívání a šíření mezinárodního jazyka věnovali především boji proti všem podněcovatelům nové války a zajištění světového míru.

K uskutečnění tohoto cíle je třeba, aby všechny naše kroužky a skupiny intenzivně spolupracovaly s organizacemi mírového hnutí ve svých místech a zemích, dávajíc jim k dispozici pro jejich mezinárodní styky náš jazyk a pomoc ve smyslu rozhodnutí Světové rady míru a pomohly jim tak navázat mezinárodní styk ve všech oborech vědy, techniky, hospodářství, umění, literatury, vyučování atd.

Jako ukázkou takového styku, který je důležitým činitelem pro přátelství mezi národy a světový mír, uvádíme práci japonských esperantistů-obráců míru, kterým se podařilo rozesláním množství informačního materiálu o hrůzách v Hirošimě, Nagasaki a v Bikini zburcovat svědomí milionů lidí v celém světě proti užívání zbraní hromadného ničení, a malou skupinu esperantistů v Otrokovicích, které se podařilo pomocí esperantského svolání podnítit tisíce lidí ve Francii k protestu proti novému vyzbrojení západního Německa.

Konference ukázala, že v Československu jsou pokrokové esperantské síly, které se zorganizovaly při závodních klubech ROH nebo při osvětových besedách a tam brzy projeví pozoruhodnou činnost v mírovém hnutí a v budování socialismu. Velkou pomocí pro ně bylo založení Světového mírového esperantského hnutí (Mondpaca Esperantista Movado- MEM), ve kterém zastáváme významnou úlohu již tím, že jeho předsedou je náš krajan, neboť cíle „MEM“ jsou v naprostém souladu s vysokými cíli Světové rady míru.

V poslední době četná rozhodnutí potvrzují vzrůst pochopení pro naše ideje a cíle: předsednictvo Světové rady míru pozvalo delegaci organizace „MEM“ na kongres v Helsinkách, výbor festivalu mládeže ve Varšavě pozval k účasti na festivalu esperantskou mládež, mezinárodní konference UNESCO jako nejvyšší kulturní instituce světa uznala oficiálně na svém zasedání v Montevideu kulturní kvality esperanta a jeho úspěchy ve vědě, technice, výchově a mezinárodním sblížení a v poslední době jsme našli pochopení také u nejvyšších vědeckých kruhů v Sovětském svazu.

Na základě těchto skutečností schvaluje konference, že dosavadní organizační stav našeho hnutí potřebuje vytvoření širšího poradního sboru všech esperantských klubů a kroužků (TEKK), který by vedl správně po ideologické a praktické stránce veškerou činnost našich esperantistů-obráců míru a který se bude snažit navázat spolupráci s národním mírovým hnutím na širší základně.

Tento výbor nechť se rovněž snaží dosáhnout povolení k vydávání pravidelného esperantského mírového časopisu a ke zvětšení našich sil zakládáním nových kroužků esperantistů-obráců míru. Naše kroužky nechť zahájí širší spolupráci s místními a okresními mírovými výbory. Musíme také důkladněji informovat širokou veřejnost o úspěších v mírové práci, kterých jsme dosáhli.

Konference vyslovuje své přesvědčení, že dalšími úspěšnými činy v mírovém hnutí brzy dosáhneme širokého pochopení u našich národů a u všech odpovědných veřejných činitelů.

Slavnostně prohlašujeme, že my, esperantisté-obráců míru se budeme snažit získat všechny pokrokové esperantisty k aktivní činnosti ve smyslu této resoluce, abychom pokud možno nejvyšší měrou přispěli ke konečnému vítězství socialismu a míru ve světě.

V Otrokovicích 10. července 1955.

za
Světové esperantské mírové hnutí:
předseda Rudolf Burda

za
Celostátní esperantský poradní sbor:
předseda Josef Vítek